


DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (825) 6, novembro—decembro 2000

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

KRISTO VENIS

Desegnaĵo de V. LAMR



INVITO AL ĈEĤESKO
Hus – Chelčice – Mácha – Čapek

KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA**

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 15,- ☉ Membro-subtenanto € 22,- ☉ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 12,-; pagante
al Libroservo € 14,-. Monsendoj de okcidentaj
monbiletoj per registrita letero al la kasisto de
KELI ☉ Se estas en via lando UEA—poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al
UEA por konto **kelk-p** de KELI ☉ Nederlanda
poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-
Maupeutuis, Francio; ☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@alterm.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!

Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,— aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reprezo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

- p. 3 Tre bona iniciato**
Kuraĝigo por plua diskuto pri la
‘Sinjormanĝo’
- p. 4 Majstro Jan HUS kaj la
Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio**
La historio de la antaŭ-Reformaciisto kaj
de la nuna eklezio
- p. 7 Petro el Chelĉice**
La historio de tiu ĉeĥa teologo
- p. 10 Baza rolo de K. H. MÁCHA en la
ĉeĥa poezio**
Ĉu vi jam legis "Maja"-n?
- p. 15 J. U. HOMMES, esperantisto jam
dum 75 jaroj**
Ne plu juna KELI-ano sin rakontas
- p. 24 Humanisto Karel ČAPEK**
El tiu aŭtoro vi certe legis...

Redaktoraĵ vortoj

Jam ses numeroj en la nova vesto de nia
revuo! Mi esperas ke la enhavo interesis vin.
Certe, ĉar pleje ĝi venas el vi.

En la nuna numero, kelkaj el la prelegoj
en Janské Lázně. Vi tiel kleriĝos pri la ĉeĥa
kulturo.

Restas ĉe mi feliĉe kelkaj kontribuoj. Ne
do maltrankviliĝu ĉar via ero ankoraŭ ne
aperis. Kiel vi povis konstati, la temo anoncita
ne estas pritraktita, ĉar pri ĝi mi ricevis ...
nenion. Por venontaj numeroj, tio, kion mi
havas sub la mano certe ne sufiĉos. Do...

En pasinta numero aperis kontribuo mia,
traduko el prelego kiun mi faris en interreligia
renkontiĝo. En ĝi troviĝis kelkaj korektendaj
eraroj: bonvolu ŝanĝi ‘karakterizaĉo’ al
‘karakterizaĵo’.

Mi ne forgesas, ke en tiuj ĉi tagoj, oni
celebras la alvenon de nia Savanto. Mi deziras
bonajn festotagojn al ĉiuj, kaj samtempe la
benon de Dio al vi, kaj al la mondo, kiu vere
bezonas ĝin.

Philippe COUSSON

TRE BONA INICIATO

En sep/okt 2000 ni povis ĝui erojn el
interreta diskutado pri „Dominus Iesus” de
Vatikano. Estas tre bona ideo, tiel kunmeti
tion kaj havigi al nia publiko. Multe pli
interese eĉ ol simpla artikolo samtema. Tie
la malsamajn voĉojn (sintenojn) oni aŭdas
multe pli aŭtente.

Kara redaktoro, faru tion pli ofte! La
revuo certe gajnos el ĝi.

Gerrit BERVELING

P.S. Je p. 6 min trafis en ero de Mike
Leon, ĉe lia komento pri la Sinjormanĝo
/eŭkaristio interalie la jeno: [post citaĵo el
Paŭlo — 1 Kor. 11]: *La Sinjoro instruis
tiun doktrinon al la apostoloj, kiuj instruis
ĝin al la postaj sekvantoj de Kristo, kiuj
konservis ĝin dum jarcentoj kaj instruis
ĝin al ni. Eŭkaristio — la korpo kaj sango
de Kristo, komunio; la tablo de la Sinjoro;
la vespermanĝo ktp — la cit-indikojn mi
forigis.*

Ŝajnas al mi, ke s-ro Leon iom misprez-
entas tion ĉi, parolante pri ‘doktrino’ — ĉar
miakomprenu la Sinjormanĝo (eŭkaristio)
ne estas doktrino sed estas ‘praktiko’,
kiun Jesuo instruis al siaj sekvantoj jam
dum sia instruada vivo, manĝante kun ĉiuj
senescepte, kun fariseoj same kiel kun
putinoj, kun riĉuloj same kiel kun plej
simplaj homoj: ne temas pri iu ‘doktrino’,
sed pri vera tipe kristana praktikado, kiu
montras ke ‘en Mesio’ (= en Kristo = en la
eklezio) ni ne plu distingus, ni manĝas kun
ĉiuj, kiuj volas partopreni tiun manĝon —
ke ‘en Mesio’ finiĝis ĉiuj diskriminacioj:
ne plu Judo ne plu Greko ne plu viro ne plu
virino ne plu sklavo ne plu liberulo [vidu
Gal 3:28]. La Sinjormanĝo dekomence
estas ekstreme riska manĝo, kiu neniun
ekskludas — eĉ riskas inkluzivi perfidulojn
[vidu Judason!]. Tiu manĝo ne estas iu
pura liturgia ‘rito’ ĉirkaŭ impone sankta

‘doktrino’, sed ĝi estas plenriska praktiko,
por jam kvazaŭ anticipante celebri la
regnon de Dio: la fruaj remonstrantoj,
laŭ mi, en la komenco de l’ 17a jc tion
jam bone konsciis, kiam meze de la tiama
persekutiĝo fare de l’ reformita eklezio,
tuj dekomence ili aldonis la inviton al
partopreno de l’ Sinjormanĝo: ‘ni invitas
vin ĉiujn kiuj ĉeestas, ĉu vi estas aŭ ne
membro de ĉi tiu eklezio aŭ de ajna eklezio
jes aŭ ne — ĉiujn ni invitas partopreni la
Sinjormanĝon, ĉar ne ni invitas sed nin
invitas La Sinjoro’. Kaj tiujn invitovortojn
al la absolute malferma celebrado de l’
eŭkaristio fariĝis ĉe ni tradicia. Laŭ mi
tute prave: la eŭkaristion neniuj eklezio,
neniuj organizo, neniuj instanco ‘mastras’ —
invitas tie nur la Sinjoro. En pluraj rondoj,
ankaŭ je episkopeja kaj sinoda nivelo,
mi plurfoje pledis por pli ofta komuna
celebrado de l’ Sinjormanĝo, ĉar male ol la
kredkonfesoj kiuj ja estas sufiĉe malsamaj
inter la diversaj eklezioj, tiu ĉi Manĝo de
Jesuo estas [krom la bapto] eble la sola
afero kiun — se rigardi serioze — ni JA
havas komune. Apud la bapto, ĝi eble estas
la sola vera ponto inter Ortodoksio, ‘Romo’
kaj Reformacio. Ne kiel ‘doktrino’, sed ja
kiel ‘praktiko’...

GB

En Dia Regno 824, sep/okt 2000, p. 11,
aperis du iom ĝenaj eraretoj: en ‘la plej fama
atakata studento estas WIERSINGA’ — la vorto
‘studento’ devas esti ‘studento-pastoro’ t.e.
pastoro por laboro inter studentoj. Iom pli poste
oni legas ke prof. Den HEYER ‘post pli ol
trijara intereklezia batalado’ ankoraŭ ne fariĝis
pastoro — devas esti ‘intereklezia batalado’,
ĉar nur lia propra eklezio povas decidi ĉu
li jes aŭ ne fariĝos pastoro. La pritraktadon
de lia peto pastoriĝi — se diri parenteze —
oni ĵus plilongigis per unujara ekstra diskut-
ado-tempo.

Gerrit BERVELING

MAJSTRO JAN HUS KAJ LA ĈEĤOSLOVAKA HUSANA EKLEZIO

Mi komencu per citaĵo el Jeĥezkel, ĉapitro 34, versikloj 1 ĝis 6:

„Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: Ho filo de homo, profetu pri la paŝtistoj de Izrael, profetu, kaj diru al ili, al la paŝtistoj: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la paŝtistoj de Izrael, kiuj paŝtas sin mem! Ĉu ne la ŝafojn devus paŝti la paŝtistoj? La grasajon vi manĝas, la grasigitan ŝafon vi buĉas; sed la ŝafojn vi ne paŝtas. La malfortajn vi ne flegas, malsanajn vi ne kuracas, vunditan vi ne bandaĝas, forerarintan vi ne revenigas, perditan vi ne serĉas; Sed vi regas super ili maldelicate kaj kruele. Kaj ili diskuris, ĉar ili ne havas paŝtiston; kaj ili fariĝis manĝaĵo por ĉiuj bestoj de la kampo, ili diskuris. Erarvagas Miaj ŝafoj sur ĉiuj montoj kaj sur ĉiuj altaj montetoj, kaj sur la tutan teron diskuris Miaj ŝafoj, kaj neniu demandas pri ili, neniu ilin serĉas”.

Jan HUS, ĉeĥa reformisto, laŭ kiu estas nomata la eklezio al kiu mi apartenas, naskiĝis probable en 1371 kaj estis forbruligita kiel herezulo dum la koncilio en Konstanz, 6.7.1415. Li mem konfesis, ke li fariĝis pastro ĉefe ĉar li volis esti estimata kaj farti bone. Sed studante teologion kaj samtempe la realan vivon de la eklezio li baldaŭ fariĝis seniluziiginta kaj komencis pripensi la grandan diferencon inter tio, kion oni predikas kaj kiel koruptoplene la eklezio vivas kaj kondutas. Li fariĝis Majstro ĉe Karola Universitato en Prago (nur paranteze: la unua universitato en Eŭropo norde de Alpoj fondita en 1348 fare de la ĉeĥa reĝo kaj Roma imperiestro Karolo la 4-a). Li fariĝis dekanato de arta fakultato (en nuna senco filozofia) kaj pli poste rektoro de Karola universitato. Krome

li fariĝis predikanto en la praga Kapelo de Betlhem apartenanta al la universitato kaj fondita por disvastigo de la Dia vorto en la ĉeĥa lingvo. Tie li povis vastigi siajn strebojn pri la neceso plibonigi la eklezion sur baza ideo de pli proksimiĝo de kredo kaj vivo. Liaj predikoj estadis pli kaj pli popularaj kaj amase vizitadaj. Inter alie li asertis, ke por fariĝi legitima oficisto ne sufiĉas nomumo, sed pli gravas la kvalifikiĝo morskpirita etika kaj morala.

Grava krizo en la universitato okazis, post kiam la reĝo Venceslao la 4-a ne sukcesis pro la rezisto de germanaj majstroj en sia strebo, ke la praga universitato subtenu la francan proponon de la solvo de la problemo de du papoj tiel, ke ambaŭ rezignu kaj estu elektita papo nova. La reĝo reagis tiel, ke per la dekreto el Kutná Hora li donis al ĉeĥaj majstroj en la universitato 3 voĉojn dum por la fremdaj majstroj restis nur unu el 4 voĉoj. Tiel ne nur ke lia propono en la universitato estis akceptita, sed tuj Majstro Jan estis elektita rektoro de la universitato.

Denove parenteze: La germanaj majstroj reagis al la dekreto de Kutná Hora (Gutenberg) per forlaso de Karola Universitato kaj fondo de la unua germana universitato en Heidelberg.

Sed al la temo.

Baldaŭ post sia elektiĝo Majstro Jan eniris en grandan kontraŭstaron kun la ĉefepiskopo Zbyněk ZAJÍC el Hazemburk, kiu ordonis bruligi ĉiujn librojn de WYCLIF. Majstro Jan forte protestis kontraŭ tio dum siaj predikoj kaj sekve la ĉefepiskopo metis super lin kondamnon (*klatbu*). Sed Majstro Jan daŭrigis sian agadon kaj skribis verkon *De libris hereticorum* (Pri la legado de

herezuloj) kaj *Replica contra occultum adversarium* (Respondo kontraŭ malkaŝitaj malamikoj). Li estis invitita al la papa tribunalo, sed li rifuzis iri tien.

En la jaro 1412 li akre ekagis kontraŭ indulgencoj, kun kiuj venis reprezentantoj de la papo Johano la 23-a, kio ankoraŭ plifortigis la antagonismon inter li kaj la pinta ekleziularo. En julio li entombigis en la kapelo de Betlhem tri metiistojn, kiuj estis ekzekutitaj post la indulgencaj ribeloj. Post tiu ago super Prago estis deklarita malrajtigo, do dum la ĉeesto de Majstro Jan en Prago ne rajtis esti praktikataj ajnaj ekleziaj aferoj, do nek baptadoj, nek entombigoj kaj eĉ la reĝo estis avertita, ke la kondamno estos direktita ankaŭ super lin. Sekve de tio Majstro Jan forlasis Pragon kaj predikis en kamparo, plejparte en Kozí Hrádek (apude la husana urbo Tabor estis fondita). Krome li diligente verkis kaj ĉeĥe kaj latine. En la ĉeĥa estas verŝajne plej grava la verko „*Jádro učení křesťanského*” (kerno de la kristana instruo) kaj el la latinaj „*De ecclesia*” (Pri la religio), en kiu estas resumata lia kompleta instruo.

En 1414 li iris al Konstanz por defendi siajn ideojn, pro kio li preparis la faman Redon pri paco (*Sermo de pace*) kiun li intencis prezenti al la koncilio, kio jam ne estis al li permesata. Tuj post la veno al la Koncilio li estis malliberigita kaj ricevis ordonon publike revoki sian lernadon. Li tamen elektis pli volonte la morton en flamoj ol perfidon de sia konscio.

Sur la evoluo de la personeco de Majstro Jan estas interese sekvi la evoluon de la homo — li, kiel junulo revis pri estimo kaj bonfarto kaj post kiam li atingis tiun sian revon, li, rekonante la grandan diferencon inter la konduto de ekleziaro kaj la diro de la Sankta Skribo li preferis perdi ne nur siajn atingojn, sed eĉ la vivon por helpi al plibonigo de la eklezio. Male ol lia antaŭulo WYCLIF aŭ posteulo LUTHER

li ne celis dispartigon de la eklezio, sed efektive plibonigon de ĝi kaj revenigon de la eklezio al ĝia origina apostola formo.

La morto de Majstro Jan provokis grandan husanan revolucion. Kiel simbolo de kontraŭstaro kontraŭ la Roma eklezio kaj aparteneco al la reformo fariĝis la komunio el pano kaj kaliko ĝenerale.

Mi jam lasu la historian fonon, disdividon de Husanoj al Taboranoj (pli radikalaj) kaj Praganoj, transformiĝo al „*Jednota*”, sed necesas almenaŭ menci, ke la tuta eklezia (kaj ŝtata, ekzemple tiel nomata „husana reĝo” Georgo de Poděbrady estis la unua kiu proponis senarmigon de la mondo) reformepoko en Ĉeĥio finiĝis kruele en 1620 post la malvenka batalo sur Bílá Hora (nun parto de Prago), post kiam devis ĉiuj kalikanoj aŭ forlasi la landon aŭ katolikiĝi.

Ni saltu nun en la jaron 1870, kiam la 1-a Vatikana koncilio akceptis i.a. la dogmon pri neerareblo de la papo rilate la demandojn de kredo, post kiu komencis formiĝi la katolika modernismo, kiu celis precipe nuligon de la eklezia administrado, enkondukon de la nacia lingvo en liturgion kaj nuligon de celibato. En Ĉeĥio la ideoj estis formulitaj precipe en la kongresoj en Prago 1897, Velehrad 1899 kaj Brno 1903. Ekstis pluraj periodaĵoj pere de kiuj formiĝis la „katolika modernismo” (*Pod jedním praporem, Novů život, Právo národa*).

Je 7.11.1918 estis fondita „*Jednota československého duchovenstva*” (Unuiĝo de ĉeĥoslovaka ekleziularo — la unua prezidanto Jindřich Šimon BAAR). Je 23.1.1919 ĝi havis la unuan kunsidon kaj akceptis la dokumenton „*Renovigo de la katolika eklezio en Ĉeĥoslovaka respubliko*”, en kiu estis precipe la jenaj postuloj:

— pli granda nombro de laikoj en la eklezio

— propono de ĉeĥa liturgio

— reformo en eduksistemo de pastroj en la spirito de modernismo

— libervoleco en akcepto de celibato

— praktikado de entombigo pere de bruligo de forpasintoj

Al „Jednota” aliĝis 90% de la ĉeĥa katolika ekleziularo. La 4-an de julio 1919 transdonis la ĉeĥa delegacio la dokumenton al la papo por eblo de ĝia trastudo, kiu restis sen ajna reago. Granda akriĝo de la rilatoj okazis post la nomumo de la nova praga ĉefepiskopo František KODRAČ, kiu estis forta kontraŭulo de la reformoj.

Post tio, la pli radikala parto de reform-emuloj sub gvido de Karel FARSKŮ fondis Klubon de reformemaj pastroj de *Jednota československého duchovenstva* (15.9.1919) kaj proponis kiel ĉefepiskopon J. Š. BAAR aŭ prof. Xaver DVOŘÁK.

Ili komencis ne nur pledi por la reformoj, sed efektive praktiki ilin, ekzemple ekde la noktomeza meso 1919 la liturgio estis priservata en la ĉeĥa lingvo. Vatikano reagis per deklaro de netoleremo de la ĉeĥa meso kaj la papo Benedikto la 15-a eĉ ne pretis ekdiskuti pri la libervoleco de celibato. Tio klare devis rezulti en la dispartigo de la eklezio.

La 8-an de januaro 1920 okazis la ĝenerala asembleo de de la Klubo de reformitaj pastroj, kiun partoprenis 215 romkatolikaj pastroj, de kiuj 140 voĉdonis por departiĝo de la romkatolika eklezio „pro ebligo de pli bona spirita vivo de ĉeĥa nacio”. La unua nomo de la nova eklezio estis „Ĉeĥoslovaka eklezio”, sendube sub influo de fondo de nova Ĉeĥoslovaka respubliko, entuziasmo por ĉeĥoslovakismo entute kaj nelaste pro strebo montri publike la kontraŭhabsburgecon, ĉar la Habsburga monarĥio estis inter alie simbolo por perforta katolikigo de nia lando. La nova eklezio klare aliĝis al la reformisma tradicio kaj deklaris sin mem kiel „Kristana, nacia, husana, moderna kaj libere teologia”.

Laŭ la doktrino de FARSKŮ ĝi komprenis Dion kiel personecan, ne akceptis la Dian Triunuon, Kristo estis komprenata kiel filo de la Dio nur en la etika kaj morala senco. Ĝi ankaŭ malakceptis la sakramentojn en la katolika kompreno.

La pastroj vestigas sin por la diservo en simplan nigran talaron kun ruĝa kaliko surbruste. La pastroj estas edukataj sur la Husana fakultato de la Karola universitato (fondita 1935). Parenteze, rilate la eduksistemon mi aludu, ke ekzistas tri kristanaj fakultatoj ĉe Karola universitato: Katolika, evangelika kaj husana. La husana akceptis eduki ankaŭ la spiritajn gvidantojn de juda kaj ortodoksa religioj, kiuj memkomprene krom komunajn objektojn havas ankaŭ siajn proprajn katedrojn.

Ekde la jaro 1947 ankaŭ virinoj povas fariĝi pastroj, kaj efektive nun virinoj estas 40% de la tuta husana pastararo.

Mi lasu la detalojn, sed fokusigu nin al la ŝanĝoj de kompreno de bazaj ekleziaj terminoj. La doktrino de FARSKŮ estis reformita en la jaro 1971 en la 4-a kongreso, kie estis akceptita la nomo de la eklezio „Ĉeĥoslovaka husana eklezio” kaj estis akceptitaj „Fundamentoj de la kredo”, kiuj denove aliĝis al la kristana instruo pri Dia Triunuo kaj atesto de kredo je dieco de Jesuo Kristo kaj ankaŭ de la Sankta Spirito. En tiu senco ankaŭ la liturgio fare de FARSKŮ devis esti reviziita kaj fakte la eklezio iom repliproksimiĝis al la katolika. Kaj male, la katolika eklezio intertempe akceptis plurajn reformojn proponitajn de la reformitaj pastroj antaŭ la fondo de la husana eklezio, ekzemple servo de meso en naciaj lingvoj kaj frunte al la homoj, permeso de bruligo de mortintoj. Kaj en la jaro 1993 estis akceptita la interkonsento inter la katolika kaj husana eklezioj pri reciproka agnosko de baptoj.

Dum la nombrado de civitanoj en 1991 al la Ĉeĥoslovaka husana eklezio aliĝis

PETRO EL CHELČICE

Uaŭdis mi volas demandi vin, kiu el vi aŭdis la nomon Petro el Chelĉice (*helĉice*)? Kaj kiu aŭdis pri Magistro Johano Hus? Multaj konas Magistron Johanon pro lia martira morto kaj sekva husana revolucio. Petro el Chelĉice estas preskaŭ nekonata. Ambaŭ naskitaj en la dekkvara jarcento, ilia aktivado apartenas al la jarcento dekkvina. La mondo konas pli multe homojn doktajn, publike agantajn, martiro estas akompanata de homamaso jam al ekzekutejo. Tia estis Magistro Johano. Tia ne estis Petro el Chelĉice. Do kion propre ni scias pri li?

Preskaŭ nenion. Eble li estis eta kampara



179 mil loĝantoj kaj ĝi havis 277 pastrojn. La plej alta tuteklezia administranto estas patriarĥo (nun Josef ŠPAK) kaj ekzistas entute 6 diocezoj gvidataj per episkopoj (Brno, Hradec Králové, Olomouc, Plzeň, Praha, kaj unu eksterlande nun en Bratislava).

Tipa por la preĝejoj de la Ĉeĥoslovaka husana eklezio estas kolumbarioj, kiuj servas por dignoplena lokigo de la urnoj kun cindro de forpasintoj en la lokon, kien oni venadas por preĝi kaj renkontiĝi kun Dio. Krome, plejparto de la preĝejoj, kiuj estis konstruitaj post la fondo de la eklezio, estas klare rekoneblaj jam de ekstere. Ili ĉiuj portas trajtojn de funkcionalisma konstrustilo kaj temas pri plurcelaj konstruaĵoj, enhavantaj ĉiam krom preĝejan salonon kaj jam menciitan kolumbarion ankaŭ preleg- kaj kunsid-salonojn kaj neniam mankantan sonorilturon.

Petr CHRDLÉ

nobelo verkanta kritikajn librojn, al la fino de la vivo spirita patro de Kunfrataro de Krista leĝo, pli poste nomita Unuiĝo de Moraviaj fratoj. Patro de nia historiografio, Francisko PALACKŮ, siatempe senkonsile ekĝemis: Ni ne povas diri certe nek lian socian tavolon, nek profesion, ni ne scias nek kiam kaj kie li naskiĝis kaj mortis.

Certecon ni havas eĉ ne pri lia nomo. Neniu lia subskribo, neniu dokumento kun lia nomo konserviĝis. Sole en unu unusola manuskripta kompleto de lia verkaro oni trovas lian baptonomon, sed en la renversita formo: RTEP. Dorsdirekte: PETR.

Petro, nomita el Chelĉice, ne povis esti kampara nobelo en la vilaĝo Chelĉice, tie rezidis Václav HRŮZA, nomita Vhlav. Tamen ekzistas ebleco ekscii iom pli pri Petro. Proksime de Chelĉice estas vilaĝo Záhoví. Tie en la fortikaĵo naskiĝis ĉirkaŭ la jaro mil tri cent okdek ankaŭ Petro, nomita laŭ la vilaĝo ZÁHORKA. Al la havaĵo de fortikaĵo apartenis parto de la vilaĝo Chelĉice. Tiel klariĝus rilato al la vilaĝo Chelĉice. La patro de tiu ZÁHORKA baldaŭ mortis, kaj pri klereco de orfo probable zorgis frato de lia patrino, onklo Hostislav, paroĥestro en Krumlov. Tie li ankaŭ fondis bibliotekon, kiu post tempo estiĝis unu el la plej grandaj bibliotekoj en Ĉeĥio. Se la menciita Petro ZÁHORKA estas Petro de Chelĉice, tio klarigas kiel Petro gajnis teologiajn konojn kaj scion de la latina.

Sciigoj pri Petro ZÁHORKA finiĝas en la jaro mil kvar cent dudek kvar. Klarigo por tio estas sekva: lia vivo daŭrigas en la vivo de Petro el Chelĉice. Ni ekkonsciu, ke Petro estis nomata Petro el Chelĉice nur post lia morto laŭ tiel nomitaj „fratoj el Chelĉice”. En la jaro mil kvarcent dudek

unu estis lia amiko Adalberto, paroĥestro el Chelĉice, brulmortigita en Budĉovice pro sia fideleco al la kaliko. Petro estiĝis spirita paŝtisto de „fratoj el Chelĉice” kaj en Chelĉice li vivis ĝis la morto.

Naskiĝfortikaĵo, simile kiel pluaj vilaĝoj en la regiono estis bruligita en la komenciĝintaj bataloj inter romkatolikoj kaj kalikanoj, kiel estis nomitaj la utrakvistoj. Porspirita zorgo instigis Petron esprimi siajn pensojn skribe. Tiel ekestis ses libroj kaj aliaj traktatoj de lia doktrino.

Kiaj estis rilatoj inter Petro kaj reformisto Magistro Johano? Ni certe scias, ke ili kune diskutis. Magistro Johano estis pli aĝa je dek jaroj. Ili simile kritikis multajn aferojn de la tiama eklezio. Diferenco inter ili estis tia, ke Magistro Johano volis reformi la tutan eklezion kaj pro tio li finiĝis sur la fajrostako en Konstanco, Petro volis vivi kun sia grupo laŭ la vivo de Kristo. Ne certas, ĉu pro sia opinio li ne finiĝis simile, se ne komenciĝus la husanaj bataloj.

Magistro Johano estis preta por la Krista vero doni sian vivon, liaj sekvoj decidigis, ĉu alpreni glavon. Petro disputas kun pragaj pastroj, kiuj akceptadis batalon, kaj disiĝas de ili. Li revenas al sia sudbohemia soleco, kaj tie, kiel ni jam aŭdis, zorgas pri la orfiĝinta gregeto en Chelĉice. Petro estas kontraŭ ĉiu batalo. Ordonon de Kristo kaj ekzemplo de lia vivo ne permesas al Petro alpreni glavon enmanen. Plue en la Biblio li vidas, ke Dio kapablas gardi siajn fidelulojn, aŭ uzi la suferojn al ilia perfektigo. Tiel ni aŭdu, kian konkludon li faris: Do, serĉi pacon pere de la monda potenco estas afero laŭmonda, sed fortorni maljustaĵojn de malbonaj potenculoj per la preĝo de fido, estas afero spirita kaj ĝi estas manifestiĝo de la fido.

Ĉi demando estas viva ĝis hodiaŭ. Por ilustrado. En kvindekaj jaroj ekestis en Kenjo libera ribelo Mau–Mau. La batalantoj ekzekutis multajn kristanojn, kiuj konsentis

kun la celo de nacia libereco, tamen ili ne volis uzi perforton. La kristanoj ne akceptis eĉ armilojn de registara soldataro por sia defendo. Multaj obstinaj batalantoj vidintaj konduton de kristanoj poste konvertiĝis. Jen la atesto de unu el ili: Mi estris grupon de batalantoj, kiuj nokte surprizatakis unu kristanan familion. Tian ordonon ni ricevis — onidire tiuj estas ĝisostaj kontraŭuloj. Sed je mia surprizo, tiu homo min ŝatis. Li diris, ke li tute ne timas morti, ĉar tuj li estos kun Jesuo. Poste li insiste petis nin ne savi lian vivon, sed nian, li petis por ke ni vekiĝu kaj faru la penton dum ni havas tempon. Ni mortigis lin, sed li mortis kun la preĝo sur la lipoj: Patro, mi petas, absolvu ilin kaj donu al ili tempon por la pentofaro. Ni revenis en arbustaron, sed la vizaĝon kaj la amon de ĉi viro mi ne povis forgesi. Fine lia Jesuo trovis eĉ min kaj nun mi volas al ĉiu rakonti pri li. Ĉi tiu viro fariĝis evangelizisto.

Ankaŭ Petro el Chelĉice ne partoprenis batalojn de husana soldataro. Li eĉ kritikis ambaŭ la partoprenintojn: Inter kristanoj nenio pli kontraŭstaras al la morto de Kristo, ol mortigi fraton ĉu el kolero, ĉu el malamo, fraton, pro kiu Kristo mortis el grandega amo. Jen alvoko ankaŭ por ni. Ni devus klare proklami: Kristanoj, kiuj batalas unu kontraŭ la alia, ne estas kristanoj, ili ne povas aparteni al Kristo, ili ne estas liaj disĉiploj.

La plej ampleksa lia verko estas *Postila aŭ Klarigo de dimanĉaj bibliaj legaĵoj kaj Reto de la kredo*. En ĉi tiu li resumis sian doktrinon. Pleje li rimarkas la rilaton de la eklezio al ŝtato. Al mi lia klarigo multe helpis al la kompreno de la bibliaj tekstoj pri la ŝtata aŭtoritato, al kiu ni subiĝu. Ankaŭ tiu ĉi demando estas ĉiam viva, ĉar ni ĉiuj estas anoj de Krista eklezio, kaj samtempe anoj de civila komunumo. Mezepoka eklezio strebis superi mondan potencon, ĝi pensis, ke tiel ĝi instalos la

regon de Kristo en la mondon. Sed ĝi ne uzis la rimedojn de Kristo, sed tiujn de la mondo. Rezulte ĝi al kutimiĝis al ĉi mondo. La eklezio devas vivi laŭ la vivo de Kristo. Anonci bonan anoncon, atesti pri Kristo, konduki la homojn al la ĉiela Patro. La Kristano la ŝtatan aŭtoritaton eĉ ne bezonas, ĉar eĉ sen ĉi regado li vivas laŭ Diaj leĝoj. Ĉar ĉiuj homoj ne akceptos la vojon de Kristo, estas ĉi tie ŝtata potenco, kiu gvidas ilin pere de siaj leĝoj. Eĉ tiu ĉi monda potenco ekzistas laŭ la Dia volo. Petro el Chelĉice similigas ĝin al barilo, kiu ĉirkaŭas komunumon, ŝtaton, kaj malhelpas, ke ili tute ne difalu. Ĉar ĉi mondan potencon plejparte partoprenas homoj, kiuj ne havas la Spiriton de Kristo, ĝia agado estas malperfekta, ofte kripla, iam eĉ persekutanta disĉiplojn de Kristo. Pro tio ni devas preĝi por ĝi, por povi kviete servi al la mondo. Ankaŭ ĉi tie estas Petro konvinkita pri la absoluta Dia suvereneco. Estu monda potenco iu ajn, fine ĝi ĉiam plenumos la Dian volon. Tiel fidrompeco de reĝo Sigmundo venigis al la martireco la fidelan Magistron Johanon.

Ankaŭ ĉi tiuj demandoj estas daŭre vivaj. Eĉ kristanoj ne akordiĝas ekzemple rilate la armean intervenon en Jugoslavio, rilate la taskon de la eklezio en la demando de Eŭropa unuiĝo, rilate la mortopunon, ktp.

Oni povus trovi multe pli da temoj kaj demandoj en la doktrino de Petro el Chelĉice. Jam pro tio, ke li tute serioze akceptas la tutan biblion, kaj la tuta biblio servas por montri al ni la vojon. Mi rigardos unusolan: *Ĉu ĉio, kion ni rigardas bona, estas bona ankaŭ laŭ Dia volo?* La mondo, diras Petro, nun estas plena de vanaj aferoj. Ĉiu laŭ propraj elpensaj serĉas Dion en la agado laŭ propra volo, kiel oni volas, kiam oni volas, kaj en kio oni volas, ne observante, ĉu oni per tio plaĉas al Dio, aŭ ne.

Tiel ankaŭ ni povas demandi, ĉu ĝuste nuna nia agado plaĉas al Dio, ĉu ankaŭ Kristo ĉeestas.

Al la fino apartenas la feliĉa fermo de la vivo de Petro. Husana utrakvista episkopo Johano el Rokycany tre estimis Petron, rekomendis liajn verkojn, eĉ sendis al li sian nevon Gregoron. Tiu ne estis kontenta kun la doktrino kaj vivo de husanoj post la fino de bataloj. La kunveno kun Petro firmigis Gregoron en lia intenco fondi religian komunumon en la spirito de Petro, — kaj tiel dum kelke da jardekoj ekkreskis Kunfrataro de Krista leĝo, hodiaŭa Unuiĝo de Moraviaj Fratoj. Petro mem tion ne ĝisvivis, tamen estis granda en sia doktrino, vivo eĉ sekvoj.

Eble vi nun pensas, ke vi ne eksciis multon pri Petro el Chelĉice. Intence mi ne volis surverĝi vin per multaj datumoj. Ne eblas instrui vin en momento nian historion, krom tio multe diskutitan. Ni estas ĉi tie pli vere por serĉi solvon de la hodiaŭaj problemoj, kiel simile Petro el Chelĉice serĉis solvon de siatempaj problemoj. Demandoj kaj respondoj povas prezenti ĉiu el ni.

Václav POSPÍŠIL
CZ Dlouhů 10, 513 01

AMIKECO-SEMAJNO

Iam estis malgranda knabo kun malbona humuro. Lia patro donis al li sakon da najloj kaj diris, ke ĉiufoje kiam li koleriĝas, li martelu najlon en la lignan barilon ĉirkaŭ la domo. La unuan tagon li enmetis 37 najlojn. Sed dum la postaj semajnoj, regante sian kolerecon, la taga nombro de la martelitaj najloj laŭgrade malkreskis. Li malkovris ke estas pli facile regi sian koleron ol meti najlon en la barilon...

Fine venis la tago kiam la knabo tute ne plu koleriĝis. Li rakontis al sia patro, kiu proponis ke la knabo nun, post ĉiu tago sen kolero, eltiru unu najlon el la barilo. La tagoj pasis kaj finfine li povis diri al sia patro, ke ĉiuj najloj estas for.

BAZA ROLO DE K. H. MÁCHA EN LA ĈEĤA POEZIO

Du preskaŭ samtempaj Esperantaj eldonoj de la ĉefverko *Majo* de Karel Hynek MÁCHA (*maĥa*) ebligas al la uzantoj de la internacia lingvo pli intime konatiĝi kun poemego, kiu fariĝis fundamento de la ĉeĥa poezio. Malgraŭ tio, ĝi kune kun la aŭtoro ĝis nun ne eniris en la mondan literaturon ĝis la grado, kiun ĝi nepre meritas.

Kiu estis Karel Hynek MÁCHA kaj kio estas ties verko?

La poeto vivis komence de la pasinta

☞

La patro prenis la manon de sia filo kaj akompanis lin al la barilo. Li diris: «Vi faris bone, filo mia, sed rigardu la truojn en la barilo. La barilo neniam estos sama kiel antaŭe. Kiam vi diras aferojn kolere, ili lasas cikatron, kiel tiuj ĉi. Eblas meti tranĉilon en personon kaj elpreni ĝin. Ne gravas kiom ofte vi pardonpetas, la vundo restos. Vorta vundo estas same malbone kiel fizika. Amikoj vere estas raraj juveloj. Ili ĝojigas vin kaj kuraĝigas vin. Ili disponigas aŭskulteman orelon, ili diras laŭdajn vortojn kaj ĉiam pretas malfermi sian koron al ni».

Estas Amikeca Semajno. Montru al viaj geamikoj ke vi amas ilin. Sendu tion ĉi al ĉiuj kiujn vi konsideras **amiko**, eĉ se tio signifas resendi ĝin al tiu de kiu vi ricevis ĝin. Se ĝi revenos al vi, vi scios ke vi apartenas al rondo de amikoj.

Feliĉan Amikeco-Semajnon Al Vi !!! Vi Estas Mia Amiko, Estas Honoro Por Mi! Bonvolu pardoni min, se mi iam lasis truon en via barilo...

Gisela

*) Ĉiam la lasta tuta semajno en februaro estas la «Semajno de la Amikeco».

Siegfried KRÜGER

jarcento (1810–1936), naskiĝis kaj vivis en Prago, nur post studo de juro li trovis laborlokon en urbo Litoměřice (*litomjerjice*), kie li pro pulmomalsano baldaŭ mortas postlasante sian fianĉinon kun ĝuste naskiĝinta bebo solaj. Sed li heredigis al la ĉefa literaturo ne tro vastan verkaron, el kiu *Majo* fariĝis senmorta. Ĝi aperis en la jaro de la morto de sia aŭtoro. Tuj post la apero ĝi vekis grandan skandalon. La samtempaj verkistoj ĝin kondamnis, la kritikistoj priskribis ĝin „*kiel nenion*“, uzante la proprajn vortojn de la aŭtoro, kiu uzis ilin en la verko. La poemo estis ĝenerale malakceptita de la samtempa kultura socio.

Kio kaŭzis tiun akran malkonsenton kun la verko? Ĝi principe naskiĝis en tempo, kiam la ĉeĥa lingvo estis en profunda dekadenco, kio estis sekvo de du antaŭaj jarcentoj post la tridekjara milito. La venko de la katolika flanko, reprezentata de la Habsburgoj, elvokis perfortan kontraŭ-reformacion, al kiu ne emis subordigi sin nekatolikaj intelektuloj, kaj ili forlasis la landon. Ege forta tavolo de ĉeĥaj kleruloj elmigris do kaj la ĝenerala klereco de simpla loĝantaro ege malaltiĝis. En la ĉeĥa reĝolando, kiu estis parto de la Aŭstra monarkio, regis la Habsburgoj, kiuj preferis la germanan lingvon kaj la ĉeĥa restis nur inter la malriĉaj kaj neklerigitaj civitanoj. Komence de la pasinta jarcento komenciĝis la nacio reviviĝi kaj ne multaj ĉeĥe pensantaj kleruloj vidis sian ĉefan taskon en kreado de entuziasmigaj kaj patriotismaj verkoj, kiuj priantas la naciajn, fote nur mitajn, heroojn, nur pozitivajn historiajn eventojn kaj pasintajn, eĉ ne verajn, naciajn atingojn. Kaj jen aperas poemo, kies enhavo

estas laŭ tiuj vidpunktoj tute neglektebla (temas pri al la morto kondamnita krimulo, kiu mortigis deloginton de sia amatino kaj nur poste ekkonis, ke tiu estis lia patro) ĉar ĝi havas nenian rilaton al la klopodoj pri la nacia renaskiĝo.

La tiutempa socio tute ne ekkomprenis, ke la ĉefa senco de la poemo kuŝas en ĝia stilo, en lingva riĉeco, en eksterordinara poetika lingvaĵo kaj ankaŭ en profunda filozofio. *Majo*, sed ankaŭ aliaj malpli konataj verkoj de K. H. MÁCHA estas fundamento de la ĉeĥa poezia lingvo, sur kiu baziĝas kreemo de ĉiuj postaj ĉeĥaj poetoj, kiuj senescepte aliĝas al la heredaĵo de MÁCHA. Kaj ĝuste pro tiu eksterordinare riĉa esprimivo, la poemo *Majo* nur malfacile eniras en aliajn lingvojn kaj MÁCHA tial restas poeto malpli konata tute neadekvate al sia granda signifo por la evoluo de la ĉeĥaj lingvo kaj kulturo. Ankaŭ ĝuste pro tio aperis preskaŭ samtempe du tradukoj de tiu poemo en Esperanto. La verkon majstre elĉeĥigis Dr. Tomáš PUMPR, kiu dum jaroj pri ĝi interesiĝis kaj poluris sian tradukon, kiu libroforme estis eldonita longe post lia morto. Enhave, lingve kaj ankaŭ forme ĝi konformas al la originalo. Sed kun la tradukmetodo de PUMPR ne kontentis Jos. RUMLER, kiu faris novan tradukon laŭ modernaj tradukprincipoj. Ankaŭ tiu, kompletigita per profunda studmaterialo, bone prezentas la poemon de MÁCHA.


La Esperanta traduko de *Majo* legindas en ajna traduko, ĉar ambaŭ prezentas pintan nacilingvan verkon en majstra esperantigo. Kaj fine oni povas konatiĝi kun la plej granda ĉeĥa romantikulo, kiu tute certe apartenas al la monda kulturo.

Vlastimil KOČVARA
Prezento en Janské Lázně

MIAJ MODESTAJ TRAVIVAĴOJ EN JANSKÉ LÁZNĚ

Post longa veturado el urbo Ruse, Bulgario, plej poste mi trafis la kongresan lokon. Jam estis malfrua vespero kiam mi eniris en «*Sola Fide*». Impresis min la konataj vizaĝoj de multaj miaj malnovaj geamikoj dum la kongresaj tagoj en Graz, Gliwice. Tiu ĉi rea kunligo varmigis mian koron. Mi estis la sola bulgara ortodoks-eklezia reprezentanto. Malgraŭ ĉio mi tute ne estis izolita, sed varme ĉirkaŭita de ĉiuj aliaj eklezianoj. Plej kortuŝaj momentoj estis la preĝejoj mesoj. Tiu ĉi etoso estis tre diferenca de la nia en ortodoksaj preĝejoj – tie ni sekvis nur la pastron kaj kantadis en malnov-slava lingvo. Fine de kongreso ni kantadis ankaŭ bulgaran kanton: «*Bulgario kara... lando kiu nutras min, kore ni salutas vin*». Post la kongreso ni forveturis al Bulgario kun mia amiko Willy el Stuttgart. En nia domo ni travivis kalkajn tagojn – poste al la bordo de Nigra Maro en mia somera dometo. Eĉ ni havis sloganon «*KELI-amikaro 2000*» videblan sur la foto. Mi esperas denove vidi ĉiujn dum la Zagreba Ekumena Kongreso en 2001.

Christo DIMITROV



Niaj membroj DIMITROV kaj SCHÄFER en la somera domo apud la Nigra Maro.

LA 1- A HILELISTA RENKONTIĜO (ZAGREB, 23-26.07.2001)

Hilelismon (hومانismon) pripensis L. L. ZAMENHOF kiel universalan religietikan ponton inter homoj naskiĝintaj, edukitaj kaj vivantaj en diversaj kulturaj, religiaj, naciaj etosoj. Esperanto estas lingva parto de tiu multe pli ampleksa kaj ambicia Zamenhofa projekto.

Fine de la aŭgusto 2000 hilelismon, en iom modernigita formo, renaskigis Hilelista E-rondo, momente (komence de la novembro 2000) konsistanta de 13 rondanoj el 12 landoj de sur 4 kontinentoj. La rondo eldonas sian duonmonatan bultenon *Hilelisto*.

La 1-a Hilelista renkontiĝo okazos inter la 23-a kaj la 26-a de julio 2001 en Zagreb (Kroatio), tiusemajna ĉefurbo de Esperantujo. Ĝin povos partopreni ankaŭ nemembroj de Hilelista rondo, nur sen rajto voĉdonadi. Dum ĝi, laŭplane, estos iniciatita fondiĝo de Tutmonda Hilelista Asocio, kaj estos proklamitaj Statuto de THA kaj Hilelista religietika principaro.

Antaŭviditaj estas ankaŭ piedekskurso tra Zagreb, unutaga (la 24-an de julio) aŭtobusa ekskurso al la nacia parko Plit vicaj lagoj (140 km de Zagrebo), estantaj sub protekto de UNESCO, prelegoj kun diskutoj, **kulturamuza programo...** Ne estas antaŭvidita kongreskotizo. Dumkongresa loĝado, por neĉeestontoj de samsemajna UK, estos ebla laŭ interkonsento kun la pormomenta kunordiganto de Hilelista rondo.

Gravas mencii, ke hilelistoj celas nek rivali, nek iuajnsence kontraŭstari, al iu ajn jam ekzistanta E-asocio. Hilelistoj havas parte proprajn celojn kaj idealojn, sed ili pretas kunlabori kun ĉiuj aliaj esperantistoj por kiel eble pli sukcesa disvastigado de

Esperanto tra la tuta mondo.

Por ricevi projekton de la Statuto de Tutmonda Hilelista Asocio, kaj/aŭ aboni *Hilelisto*-n (abono al la elektronikpoŝta versio de *Hilelisto* estas senpaga, paperpoŝtan version oni povas aboni pagante sendokostojn), bonvolu kontakti pormomentan kunordiganton de Hilelista E-rondo: Mato SPEKULJAK, Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio — retadreso: mato.spekuljak@zg.tel.hr

Gazetara Komunikado pri nova libro

„LA HOBITO” APERIS EN ESPERANTO

Post la sukcesa eldono de la trivoluma verkego „*La Mastro de l' Ringoj*” de John Ronald Reuel TOLKIEN, en la traduko de William AULD, „Sezonoj” (Jekaterinburg, Ruslando) eldonis plian verkon de la sama aŭtoro – la faman mirfabelon „*La hobito*”.

William AULD partoprenis en la tradukado de „*La hobito*” per esperantigo de la poeziaĵoj, sed la tutan prozan parton tradukis d-ro Christopher GLEDHILL el la universitato de St. Andrews (Skotlando).

„Sezonoj” eldonis „*La hobito*”-n kiel la naŭan volumon en la libroserio „*Mond-literaturo*”, en kiu antaŭe aperis ankaŭ „*La Mastro de l' Ringoj*”. La libro havas 224 paĝojn, fortikan bindon kaj trikoloran kovrilon de Maša BAĴENOVA. Ŝi kreis ankaŭ bildojn por ĉiu ĉapitro (entute 19). „*La hobito*” estos mendebla ĉe UEA, FEL, ELNA kaj aliaj gravaj libroservoj kontraŭ 15 eŭroj aŭ rekte ĉe la eldonejo:

Poŝte: RU-620014 Jekaterinburg-14,
p.k. 162, Ruslando;
rete: <sezonoj@mail.ru>
<http://www.sezonoj.itgo.com>

KIU ESTAS ESPERANTISTO?

La estonteco de Esperanto dependas de la kvalito de la esperantistoj. Kiu, do, estas esperantisto? Laŭ ZAMENHOF, ĉiu kiu lernis la lingvon kaj uzas ĝin.

Survoje al la unua kongreso de Esperanto en Bulonjo, 1905, grupo de esperantistoj fanfaronis pri la baldaŭa «venko» de Esperanto. Kazimierz BEIN (KABE) ne aliĝis en tio sed murmuris «*Unue la esperantistoj devas lerni Esperanton*». Tio ĉi laŭ kion skribis Ferenc SZILAGYI enkonduke al sia lernolibro *Ellernu*.

Mi memoras tion leginte plurfoje en la lastaj jaroj la vorton *kabeis* en gazetoj. KABE ne povis spiri en sia parto de Esperantujo sen maturaj esperantistoj. Ŝajne oni finfaris elementan kurson kaj kredis sin majstroj de la internacia lingvo sen daŭrigi kaj **ellerni** ĝin. Do fariĝis senprogresaj «*eternaj komencantoj*». KABE ne eltenis tion kaj finfine forlasis la movadon.

En la hodiaŭa tago la situacio ŝanĝiĝis tiel, ke kvazaŭ-majstroj povas aperi eĉ en gvidaj pozicioj kaj tiamaniere fakte minacas la prestiĝon de la lingvo kaj eĉ povas ridindigi la movadon kaj malhelpi ĝian progreson. Se iu hazarde ekkrias ke «*la reĝo ja estas nuda*» (ANDERSEN), tiu estas forpuŝita kiel ofendanto kaj la reĝo rifuzas dece vesti sin.

Mia intenco estas ne ofendi, sed iu devas kontraŭstari kaj kritiki evidentajn faktojn por ke, se eblas, fariĝu saviĝo, des pli en kristana medio, ĉu ne?

Mi elvokas novajn generaciojn, se ekzistas, kiuj **ellernis kaj uzas** la lingvon, ke ili kuraĝe finfine aperu kaj transprenu la torĉojn!

Ake AHLRÉN (82)

MODESTA MEMORAĴO ANTAŬ LA SOJLO DE 2000-JARA JUBILEO

Bulgara esperantisto rakontas

Estis la jaro 1942. Mi estis knabo 12-jaraĝa. Unu mateno dum malfrua nebula aŭtuno mi eliris el la kort-pordo de nia domo voje al la lernejo. Subite mi rimarkis blankan ĉevalon rajditan de policisto kaj antaŭe piediranta maljuna homo kurbita lace trenadis siajn piedojn. Alproksimiĝante la policisto demandis: „*En kiu domo loĝas Dimitri PETKOV?*” Tiu ĉi estis la nomo de mia patro. Jen, tie ĉi kaj mi ekkriis: „*Paĉjo, paĉjo oni vin serĉas*”. Kiam mia patro alvenis, la policisto ordonis: „*Vi estas Dimitri Petkov? Jes? Vi devas subskribi tiun ĉi paperon kaj pagi la indikitan sumon por la transporto kaj venigo de tiu ĉi homo*”. Dum tiu ĉi momento venis ankaŭ mia avino Dona. Kiam ŝi vidis tiun ĉi kurbitan maljunulon, ŝi akre ekkriadis: „*Oh! Kie vi estis dum tiom da jaroj, kiom vi gajnis kaj kial vi revenas?*” Estis ŝia edzo kiu forlasis la landon en 1908-a jaro, kiam mia patro estis kelkmonata bebo kaj foriris kiel legom-gardenisto en Rusio. 34 jaroj sen anonco, sen reveni. Mia patro pagis al la policisto kaj estime kisis la manon de sia patro, kium li unue vidis en sia vivo. Sekvontjare, mia avo mortis pro kancero sen pronomci unu vorton antaŭ ni. Mia avino unufoje interdividis, ke li nur menciis: se la reĝimo en Bulgario estiĝos kiel tiu ĉi en Rusio de 1917 ĉiuj homoj estiĝos mutaj.

La sekvontan jaron 1943/1944 estiĝis komunista regino en Bulgario, severa Stalina epoko. Malgraŭ ĉio mi eniris kiel regula lernanto en Pastra Seminario en Sofio. La trian jaron de mia studado, unu fruan aŭtunan tagon mia patro anoncis, ke

mi devas interrompi mian studadon en la Seminario pro manko de mono. Mi ploris kiel malgranda infano tutan nokton.

Frumatene mi vidis antaŭ mia domo kelkajn veturilojn, homojn, kiuj portadis pezajn sakojn plenajn de tritiko—grenoj. Mia patro vendis la lastan greneron kaj donis la monon al mi por pagi la lernejan kotizon.

Dum unu somerferia tago, mi revenis de Sofio al mia hejmo en Gorica, distrikto de Popovo. Mia patrino diris al mi, ke mia plej bona amiko Petro malsaniĝis kaj kuraciĝas en la distrikta hospitalo en Popovo.

Vizitante lin mi ekvidis libron „*Kurso de Esperanto*”. Mi tuj prenis ĝin kaj ekinteresiĝis „*kio estas Esperanto?*” Unuafoje mi aŭdis pri ĝi foliumante la paĝojn. Mi tuj komencis legi, traduki kaj Petro miris, kvazaŭ mi longe praktikas tiun ĉi lingvon. Mi jam longe studadis en Seminario: latinan, grekan, francan, italan kaj ĉio estis komprenebla por mi. Mi tuj mendis la lernolibron en Sofio, kune kun aliaj help—materialoj, ankaŭ Esperantan insignon.

Unu tagon mi veturadis per trajno kaj la konduktoro ekvidis mian esperanto—insignon, rapide ekparolis Esperante tiel glate kaj fluante kaj mi konfuziĝis. Poste la konduktoro klarigis, ke baldaŭ okazos en Sofio la unua postmilita bulgara Esperanto kongreso, en la monato junio 1956-a. Mi tuj aliĝis kaj partoprenis la unuan por mi ne nur kongreson, sed Esperantan baptigon. Venis ne multe da kongresanoj. Inter ili F-ino Marcelle ROBINEAU, S-ro Ivo BOROVIČKI kun siaj gestudentoj el Zagreba Medicina Fakultato. Mirigis min la altkvalita prononcado de D-ro BOROVIČKI kaj mian tutan postan vivon mi restis lia arda adepto.

La jaroj flugadas unu post la alia. Post finstudado de Pastra Seminario en 1951-a,

mi daŭrigis mian studadon en Alta Pedagogia Instituto, fako Franca Filologio. Intertempe mi organizadis multnombrajn Esperanto-kursojn kun gestudentoj en mia luita loĝejo, kaŝe pro la severa Stalina reĝimo.

Fine de mia studado mi subite malsaniĝis de peza malsano (tuberkulozo pulna /tbc/) kaj oni adresis min al sanatorio „*Iskrec*” por operacio (plastiko) forprenante kvin aŭ sep ripojn. Duono de la operaciitoj mortadis sur la kirurgiaj tabloj kaj aliaj invalidiĝis. Tion mi skribis al mia intima peresperanta korespondantino, la flegistino F-ino Mercedes Aŭdina CLAVER et urbo Manresa (Hispanio). Ŝi tuj prizorgis pri mi kaj post nelonge al mia adreso en la Sanatorio alvenis granda pakaĵo de efikaj medikamentoj: hidromicin, pask kaj aliaj. Oni kuracigis min pere de tiuj ĉi medikamentoj kaj mi resaniĝadis de tago al tago. Unu tagon post tri monata kuracado, la ĉef-kuracisto ellistigis min de la Sanatorio tute sana dank'al Esperanto kaj Mercedes. Bedaŭrinde mi neniam ŝin vidis por danki almenaŭ ĝis nun kiam mi ĝisvivis 70-jaraĝa.

Mi edziniĝis en 1967-a. Mia edzino Nadia estas ankaŭ esperantistino. La unua infano, Dimitri, en 1969-a estis baptita de aŭstra esperantisto Dr. Prof. Ernst GÖRLICH el Vieno. La dua infano, Varia, knabino, en 1971-a baptita de franca esperantistino Jeannine DESPINEY el Le Perreux.

Postsekvis: prelegvojaĝoj, Esperanto-kongresoj, kursgvidado... la lastaj Esperanto—eventoj: la Ekumena Esperanto-Kongreso en Gliwice, Pollando, kaj la kristana kongreso en Janské Lázně, Ĉeĥio. Neniam mi estis altnivela funkciulo, sed nerimarkinda ero, digna por la Zamenhofa modesteco.

Kristo DIMITROV

J. U. HOMMES, ESPERANTISTO JAM DUM 75 JAROJ

Mi estis 17 jara kaj studis je la instruista ŝtatseminario en mia loĝloko Winschoten. Kelkan tempon jam mia patro estis sekvanta la reklamon por la internacia lingvo Esperanto. En 1925 li estis unu el la unuaj kiu abonis la „*Nimegan Esperanto—Kurson*”. Mi tuj interesiĝis pri ĝi. Ĉiun sabatmatenon nova leciono de tiu skriba kurso kuŝis sur la pordomato kaj patro kaj filo, tagmeze revenintaj hejmen de sia laboro kaj lernejo, rapidis por tralegi ĝin.

Kelkajn jarojn poste oni nomumis min instruisto al kristana bazlernejo en Nijverdal en la provinco Overijssel. En mia nova loĝloko mi renkontis junan instruistinojn, kiu poste dum pli ol kvindek jaroj estis mia kara edzino. La feliĉa tago de mia amdeklaro estis la 10-an de majo 1930. Ŝi proponis fari, okaze de nia juna feliĉo, biciklan ekskurson la sekvantan sabaton. Tamen, mi devis seniluziigi ŝin! Tiun tagon oni fondos la landan unuiĝon de kristana esperantistoj en Amersfoort kaj mi nepre volis ĉeesti ĝin. Ĉu ne mirige, ke de la komenco ŝi ne multe ŝatis mian karan Esperanton?

Mi do nun eble estas la plej aĝa membro de nia unuiĝo, kiu tiam nomiĝis N. P. (Nederlanda Protestanto). Pli frue mi jam aliĝis al I. E. L. — Internacia Esperanto Ligo — kiu poste ŝanĝis sian nomon en U. E. A. Tiel mi jam sepdek jarojn ricevas ĝian oficialan revuon „*Esperanto*”.

En majo 1940 la germanaj armeoj invadis nian landon kaj subite finiĝis ĉiuj internaciaj kontaktoj kiujn mi letere subtenis. La kristana kaj neŭtrala Esperanto-unuiĝoj en kiuj mi membriĝis, silentis. La adresoj estis kaŝitaj aŭ eĉ neniigitaj de la

sekretarioj. La ‘naziistoj’ ne aprecis tiajn internaciajn aspirojn, kaj pluraj eminentuloj estis arestitaj aŭ eĉ murditaj.

Kelkan tempon post la germana okupado ektrafis min anonco en lerneja gazeto. Mi legis ke la kristana Esperanto—movado denove ekfloras kaj serĉas novajn membrojn. Kvankam aktiva de la fonda tago, mia nomo evidente malaperis el la membrolisto. Mi denove aliĝis.

En la ‘mallumaj’ militaj jaroj mi estis ofte pripensinta nian strebadon. Laŭ la evangelio de Mateo „*la granda novaĵo de la regno de Dio estos predikata tra la tuta mondo*”. — Tion devos fari homoj, mi pensis. Ĉu ni, kristanaj esperantistoj ne havas taskon pri tio?

Por nia monata revuo „*Kristana Gazeto*” mi, sub la pseŭdonimo „Johan van Noord” verkis kelkajn artikolojn kun la titolo „*Letero al Erik*”. Per ‘Erik’ mi celis nian komunan strebadon: ‘*Esperanton Reklami Inter Kristanoj*’. Mia argumentado estis ke krom tio ni havu alian celon: atesti inter ne—kristanoj pri nia kristana fido kun la moto „*La evangelio per Esperanto*”.

Multaj membroj pozitive reagis. Sekve de tio estis decidite ke la unuiĝo efektivigu tiun ‘misian taskon’.

Oni kolektis la bezonatan monon, kiun la kasisto de K. U. N. E. administriis en aparta kaso. Ankaŭ ne—esperantistoj kontribuis. Kartoj kun bibliaj tekstoj estis kaligrafitaj kaj presitaj. Libretoj kun bibliaj partoj estis menditaj ĉe ‘Brita kaj Alilanda Biblia Societo’. Ankaŭ la svedoj povis liveri materialon.

En tiu tempo, ne longe post la milito, vojaĝi eksterlanden estis preskaŭ neeble. Niaj najbarlandoj estis detruitaj kaj ne

GRUPE-4 GLIWICE'A RENDEVUO DE UZANTOJ KAJ PRAKTIKANTOJ DE ESPERANTO

Gliwice, 10.11-12.11.2000

En la sudpollanda urbo Gliwice jam kvar foje renkontiĝis esperantistoj por partopreni la aranĝon GRUPE. Venis esperantistoj el la tuta lando. Malfermon de la **rendevuo** partoprenis preskaŭ 50 personoj. Nome de la urbaj instancoj la partoprenantojn salutis persone la prezidanto de la urba konsilantaro Zdzisław GOLISZEWSKI.

GRUPE-4 estis ligita kun la 750-a dat-

☉

allogaj kiel ferilandoj. Krom tio oni ne havis monon.

Ankaŭ nia registaro ne havis. Pro la 'devizo-kontrolado' ne-necesa vojaĝado eksterlanden ne eblis. Sed por la poŝto tio ne validis kaj landlimoj apenaŭ ekzistis por ĝi. Aĉetado de kelkaj poŝtmarkoj por neni estis obstaklo. Estiĝis vigla korespondado kun samideanoj en proksimaj kaj foraj landoj. Al sia leteroj oni povis facile aldoni malgrandformatan libreton kun la evangelio laŭ Marko aŭ Mateo kaj de la Psalmaro. Se la plum-amiko aŭ -amikino reagis pozitive, oni povis prezenti la evangelian mesaĝon kaj alsendi ekzempleron de la Nova Testamento.

El diversaj landoj pozitivaj reagoj estis ricevitaj. Tamen preterpasis tiu tempo. En nia „ora epoko” la intereso pri Esperanto kaj pri niaj celadoj per ĝi estas preskaŭ nula. Sed kristanoj estas optimismaj. Ĉar unu afero estas certa: „Kristo venkos!” Venos Lia Regno! Al tiu mesaĝo ni kunlaboras. Ankaŭ per Esperanto, tiel longe kiel ekzistos homoj kiuj ĝin komprenas!

Apeldoorn, la 27-an de Aŭgusto 2000.

J. U. HOMMES

(notis ĝin el lia buŝo kaj tradukis:

Leen HORDIJK)

reveno de la urbo Gliwice.

Dum diversaj programeroj oni interalie parolis pri la preparo de la novaj programoj por la instruado de nia lingvo. Dum du tagoj alveninta instruistaro diskutis pri tiu problemo kaj instruado de esperanto en Pollando. Krome estis kelkaj interesaj prelegoj interalie pri: uzado de la interreto (Stanisław MANDRAK), historio de la esperanta movado (Zofia BANET-FORNAL) kaj e-konkurso gvidata de Marian ZDANKOWSKI.

Dum la vesperoj prezentiĝis Jerzy FORMAL kun interesa filmo pri lia restado en Japanio (bedaŭrinde pro malsano li ne povis prezenti spektaklon), Jadwiga GIBCYŃSKA kun teatraĵo *Verda ZOO* kaj Georgo HANDZLIK kun ĉiam belegaj kantoj.

Dimanĉe okazis esperanta sankta meso kiun celebris pola animzorganto pastro Józef ZIELONKA kaj loka, gliwice-a esperantista animzorganto pastro Jan SIEMIŃSKI.

Poste prezentiĝis konata krakova grupo **Kamea** kun interesaj kaj bone preparitaj kantoj. Okazis ankaŭ renkontiĝo kun la Ĉefa Estraro de PEA.

Kvankam ne venis tiom multe da esperantistoj kiom dezirus la organizantoj, ĉiuj konstatis ke GRUPE-4 plenumis sian celon kaj sukcesis.

Ĉiuj partoprenantoj deklaris sian intencion veni al Gliwice denove venontjare, aŭtune por partopreni esperantan, jam jubilean, kaj unuan en la nova jarmilo rendevuon GRUPE-5.

Raporton preparis

Stanisław MANDRAK
<staman@ka.onet.pl>

UNU IMPONA EKZEMPLO

Antaŭnelonge la informo kuris tra la amas-komunikiloj, ke la sud-korea prezidanto KIM Dae Jung ricevos la nun-jaran Nobel-premion pri paco. En politiko, rare ni renkontas homojn kiuj estas modeloj por aliaj. KIM Dae Jung estas unu el la malmultaj esceptoj. Per sia vivo li donas al mi ekzemplon, laŭ kiu mi volus orienti min, ankaŭ ĝuste kiel kristano. Kial?

Jam kiel juna politikisto, KIM Dae Jung pasigis plurajn jarojn en prizono, pro sia opono al la militista reĝimo en Suda Koreio. Post liberiĝo li fariĝis la plej grava gvidanto de la opozicio en sia lando. Dum vizito al Japanio en aŭgusto de 1973, la sud-korea sekreta polico kidnapis lin, por dronigi lin en la oceano, kateninte lin kaj fiksinte pezajn ĉe liaj manoj kaj kruroj. Last-momente, usona helikoptero savis lin. Kiel kondukas persono postvivinta ion similan?

KIM Dae Jung senhezite plu faris, kion li antaŭe faris. Li organizis la opozicion kaj luktis por liberaj elektoj kaj demokratio en sia hejm-lando.

Kelkajn jarojn poste, lia vivo denove pendis ĉe silka fadeno. En 1980 la reĝimo verdiktis lin al morto. Estis precipe la premo el eksterlando, kiu savis lin de ekzekuto. Oni deportis lin al Usono. Sed spite al la danĝero, post tri jaroj li reiris al Suda Koreio, por plu batali por libero kaj homaj rajtoj.

Ankoraŭ daŭris jarojn, ĝis la diktatora sistemo estis venkita kaj oni fine, en decembro 1997, elektis la 72-jaran KIM Dae Jung prezidento de Suda Koreio.

Sed por li, la vivo-tasko ankoraŭ ne estas plenumita. Nun li luktas por paco kaj repaciĝo inter la malamikaj frataj ŝtatoj de Norda kaj Suda Koreioj. Pro tio multaj nomis lin revulo. Sed en junio de la jaro 2000 sub la okuloj de la surprizita monda

publiko okazis pinta kunveno inter li kaj la malamata gvidanto de Norda Koreio.

Kiel sukcesas tiu viro, malgraŭ multnombraj fiaskoj kaj morta danĝero, etendi sian manon al la kontraŭuloj kaj neŝanceleble sekvi sian vivo-celon? Kiam en 1980 li estis jam kondamnita al morto, li skribis al sia filo: «*Nur la vere fortaj kapablas pardoni kaj ami.*» Al mi ŝajnas, ke tie kuŝas la ŝlosilo por lia vivo. KIM Dae Jung havas profundajn radikojn en la kredo. Li scias, ke liaj politikaj celoj respondas al la volo de Dio. Tiu certeco lanĉas nekredablajn energiojn. Min tio memorigas pri eldiro de Martin LUTHER: «*Tio estas la plej alta konsolo, se iu certas ke lia agado respondas al ordono de Dio.*» La volo de Dio, jen fonto de forto. Tial KIM Dae Jung povas pardoni al siaj kontraŭuloj kaj ĝuste per tio neŝanceleble antaŭeniri al siaj celoj. En tio li estas por mi ekzemplo, kiun mi volonte sekvus.

Wilfried KRAUSE
pastoro de la komunumo
de S-ta Tomaso en Kirchheim

el la germana tr. A. BH.

Esperplena komenco en Berlino?

En oktobro la nova KELI-membro pastro Martin GESTRICH invitis kristanojn esperantistajn veni al sia loĝejo. Bedaŭrinde ni nur estis sesope, sed tamen kune laŭdis Dion per laŭdkantojn, aŭdis meditadojn mallongan pri la Biblia teksto en 1 Johano 5:4 (Jen estas la venko venkinta la mondon: nia fido) kaj kune parolis pri eblaj estontaj agadoj. Per komuna preĝado de la «Patro nia» ni finis nian 2,5-horan kunvenon.

Dio benu tiun modestan komencan en la germana ĉefurbo.

Gerhard HOFMANN

INDEKSO POR LA JARO 2000

- Aktualaĵo:**
Kirchentag: germana katolika tago de la Eklezio – Hamburgo 2000; MATTHIAS, Ulrich; 820; 22
Kareno el Birmo vizitinta Parizon; LHERMENAULT, Etienne / COUSSON, Philippe trad.; 822; 10-11
Blindaj tibetaj infanoj serĉas vidantajn okulojn; TUINDER, Jacques; 822; 12-13
Projekto „indigenaj dialogoj”; VAN DIJK, Els; 822; 16-17
Nova vesto, nova revuo? Via revuo!; COUSSON, Philippe; 822; 20-21
Konferenco pri eskatologio; POKORNÝ, Josef; 822; 9
Dio ĉeestas (eltrovu, ĉu veras); PFLÜGER, Reinhard; 822; 10
Kanzonfestivalo sen bona tono; WEG, Noor; 822; 18
Rezolucio de Unesko pri plurlingveco; 823; 20-21
Himnoj sur la reto; ROSS, Leland B.; 823; 13
Esperanto traktota en *Ethnologue*; 823; 14
Eŭropa jaro de lingvoj; 823; 22
Eŭropa ekumena renkontiĝo de 2001 en Strasburgo (Francio) por soleni la novan jarmilon; SARANDREA, Carlo; 824; 13-14
La lingvoj en Vatikano; BURKHARDT, Adolf; 821; 16
Daŭrigo de laboroj super *Adoru*; BURKHARDT, Adolf; 821; 18
Unu impona ekzemplo; KRAUSE, Wilfried / BURKHARDT, Adolf trad.; 825; 17
- Biblio:**
Al la Efezanoj; BERVELING, Gerrit; 820; 3-7
Al la Tesalonikanoj I; BERVELING, Gerrit trad.; 823; 4-6
Al la Tesalonikanoj II; BERVELING, Gerrit trad.; 823; 7-8
Al Filemono; BERVELING, Gerrit trad.; 823; 3
- Diversaĵo:**
Alvokiĝo; TUINDER, Jacques; 820; 24
Paketradio: nova speco de transsendado de informoj kaj de komunikado; WOZNICKA, Jozef; 821; 19
La glora ĉeesto; ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi G.; 822; 8-9
Heroo de historio: KAGAWA el Japanio; HAYWARD, Peter; 822; 3
La savanĝelo de Oberkochen; SCHAEFFER, Karl Heinz; 822; 13
Regulo de ĝentileco rilate al blinduloj; TUINDER, Jacques; 823; 24
Baza rolo de K. H. MÁCHA en la ĉeĥa poezio; KOČVARA, Vlastimil; 825; 10-11
Humanisto Karel ČAPEK; KOČVARA, Vlastimil; 825; 24
- Kongreso:**
Listo de aliĝintoj (31.01.2000); 820; 21
Provizora programo de la 50-a KELI-kongreso; 821; 24
Tagordo de la jarkunveno de KELI; VAN DIJK, Els; 822; 21
La KELI-kongreso en Jánské Lázně (CZ) antaŭ la pordo; CHRDLÉ, Petr; 822; 24
Impresoj de la 50-a KELI-kongreso (2000-08-05/12); VAN DIJK, Els; 824; 17-19
Protokolo de la KELI-jarkunveno (10-08-2000); VAN DIJK, Els; 824; 19-21
Kristana Esperanto-Kongreso (50-a de KELI); COUSSON, Philippe; 824; 16
Impreso pri kongreso; [HUB, Marianne]; 824; 16
Miaj modestaj travivaĵoj en Janské Lázně; DIMITROV, Christo; 825; 11
- Movado:**
Esperanto en 1999; KORJENKOV, Aleksander; 820; 8-10
Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA; ENDERBY, Kep; 820; 11-12
Por doni al vi estontecon kaj esperon; BURKHARDT, Adolf; 820; 14-15
Kep ENDERBY: esperantisto de la jaro 1999; GORECKA, Halina; 820; 12
Mesaĝo al iu infano en la mondo; HOUVIEZ, Maryvonne; 820; 13
Kontribuo petata por „50 jaroj por Esperanto, Paco, Ĉinio”; 820; 24,23
Henk DE HOOG 90-jara; HORDIJK, Leen; 821; 3-5
Sekretaria jarraporto pri la jaro 1999; VAN DIJK, Els; 821; 20-21
Ĉu io bona povas veni el Raŭma?; PICASSO, Marco; 821; 14
Oficiala antaŭkongreso en Amano, Jordanujo; 821; 15
Liro-2000; 821; 17
Komuniko de la Akademio de Esperanto; 821; 18
3-a renkontiĝo de xehqj kaj slovakaj katolikoj esperantistoj; NEMEC, Vlado; 822; 11
Bona jaro por koresponda servo mondskala; 822; 11
Alfred H. FRIED; BURKHARDT, Adolf; 822; 16
„Karnavale” estas la verko de la jaro 1999; 822; 17
Vizito al la unua prezidanto de KELI; AHLRÉN, Anna-Lisa / AHLRÉN, Åke; 822; 19
Esperanto kaj esperantistoj en estonteco; COUSSON, Philippe; 823; 16-18
Esperanto kaj sporto; KOFFI, Gbeglo; 823; 18-19
Gresillon: 1-a etaĝo ree funkcias oficiale; BOYER, Henri; 823; 13
ZEO-j en Gliwice; MANDRAK, Stanisław; 823; 14
Internacia Esperanto-Instituto 70-jara; ORELLANA ROJAS, Atilio; 823; 15
Mesaĝo de elektito; TUINDER, Jacques; 824; 14-15
70-a itala kongreso de Esperanto; ACKERMANN, Edvige; 824; 12
53-a IKUE kongreso; BELOŠEVIČ, Maria; 824; 12
Pri Radio Aŭstria Internacia al ĉiuj kiuj interesiĝas pri la temo; FETES-TOSZEGI, Katalin; 824; 15
Elektio de himnoj; BURKHARDT, Adolf; 824; 23
La plej granda Esperanto-katalogo en la reto; FARUKUOYE, Helga; 824; 24
Amikeco-semajno; KRÜGER, Siegfried; 825; 9-10
La 1-a hilelista renkontiĝo; SPEKULIAK, Mato; 825; 12
Kiu estas esperantisto?; AHLRÉN, Åke; 825; 13
Modesta memoraro antaŭ la sojlo de 2000-jara jubileo; DIMITROV, Christo; 825; 13-14
J. U. HOMMES, esperantisto jam dum 75 jaroj; HOMMES, J. U./ HORDIJK, Leen; 825; 15-16
Grupe-4 Gliwice’a rendevuo de uzantoj kaj praktikantoj de Esperanto; MANDRAK, Stanisław; 825; 16
- Nekrologo:**
Wim VAN GANSWIJK; VAN DIJK, Els; 820; 22
[Neeltje SIMONIDES]; VAN DIJK, Els; 821; 23
Nekrologoj el Ĉeĥio; POLNICKÝ, Pavel; 822; 21
Nekrologo de Jantina Laurentia PUTTO (Tini); DERCKS, Gerda; 822; 22
[FARKAS Jozsef]; COUSSON, Philippe; 822; 22
Forpaso de Episkopo Wł. MIZIOŁEK; PIETRZAK, Barbara; 822; 22
Nekrologo [DONEIS]; BURKHARDT, Adolf; 825; 23
- Poezio:**
Venu Spirito Sankta; ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi G.; 820; 7
Rebriletoj el mia pasinteco; AHLRÉN, Åke; 822; 14-15
Rigardu belmatenon!; PERKIÖ, Pia / KARKIAINEN, Anja trad.; 822; 21
Tini Putto; Shorty (SHORTLAND, Ena); 822; 22
Al Jesuo; BURZO, Doina; 823; 12
- Recenzo:**
Vojserĉa verko pri lingvopolitiko; 820; 19
Furora libro pri rasismo nun en Esperanto; 820; 19
Legolibro de Betty SALT; 821; 16
Esperantaj sinonimoj denove haveblas; 821; 16
Faka aplikado; SARKÖZI, Janos; 821; 17
Ke ĉiuj estu unu; BERVELING, Gerrit; 822; 6-7
UEA eldonis lernolibron pri demokratio; 822; 18

„La Hobito” aperis en Esperanto; 825; 12

Teologio:

Tempo, tempoj; COUSSON, Philippe; 820; 16-18

Ne adorkliniĝu antaŭ via laboro; CHAMBERS, Oswald / VEIT, Jerald trad.; 820; 18

Aŭrelio Aŭgustino (354-430) el Konfesoj, libro II; BERVELING, Gerrit trad.; 821; 5-8

La enkonduko de monaĥismo en la franca protestantismo; CLÉMENT, Michel; 821; 8-10

Komuna deklaro pri la doktrino de pravigo; BURKHARDT, Adolf; 821; 10-11

Ekumenismo de kvakera vidpunkto; HOWARD, Martin; 821; 12-13

Mallonga meditado por Pasko pri Johano 3:16; VEIT, Jerald; 821; 13

Dio tra homaranismo kaj kristanismo; ZECCHIN, Armando; 822; 4-5

La protestantoj kaj la familio; COUSSON, Philippe; 823; 10-12

Penseto pri la fino; HARLER, Edwin; 823; 8-9

Ekumeno: Ĉu komuna Sankta Manĝo?; SCHAEFFER, Karl Heintz; 823; 9

Ĉe l' sinjora flanko, ne eblas manko; OSHÓ-DAVIES, Olúwábunmi G.; 823; 23

Pri 'Dominus Iesus' sur la listo de IKUE; 824; 3-10

Malagrablajoj en eklezia Nederlando kaj ali-loke...; BERVELING, Gerrit; 824; 10-12

Kia liberaleco decas al kristano?; PFLÜGER, Reinhard; 824; 21

Opinioj pri recenzo; ZECCHIN, Armando; 824; 22

Tre bona nciato; BERVELING, Gerrit; 825; 3

Majstro Jan HUS kaj la Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio; CHRDLÉ, Petr; 825; 4-7

Petro el Chelčice; POSPÍŠIL, Václav; 825; 7-9

Nederlando: 378964 (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 4,54 EUR)

Svedio: 74374-0

Svislando (Bulle): 12-2310-0

3. Poŝtgire al la KELI-konto

Nederlando 5506132 (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 4,54 EUR)

4. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**

5. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto,

6. Per okcidentaj monbiletoj, senditaj al la KELI-kasisto.

Landaj kotizoj en 2001

Belarusio (vidu ĉe Rusio)

*)

Britio

12 GBP

Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 nome de Fellowship of British Christians Esperantists (FBCE). Kasisto: Tom Neil, 37 Soutar Crescent, Perth, Skotlando, PH1 IQB
Tel.: 01 738 623 699

Bulgario

*)

Peranto: Ĥristo Dimitrov, str. Stracin 16, BG 7300 Kubrat

Ĉeĥa Respubliko (inkl. Slovaka Respubliko)

160 CZK

Peranto: Pavel Polnický, Lesní 150/VI
CZ 29001 Poděbrady, Tel.: 0324(61)5651

Estonio

*)

Peranto: Helli Tammik, Käbi tn 4-10, EE 90506 Haapsalu

Finnlando

150 FIM

familiaj membroj

25 FIM

Poŝta konto n-ro 800027-4306 454 nome de Suomen Kristallinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili Salminen
Kivikatu 8 C 51, FI 15700 Lahti, Tel.: 03-781 7637

Francio

130 FRF

CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe Cousson
26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis
Tel.: 05 49 468021

Germanio

38 DEM

Poŝtgirkonto Hamburg n-ro 109204-206, BLZ 20010020
nome de Sonderkonto Esperanto. Kasistino: Astrid Hanke
Am Friedrichshain 37, 25980 Westerland/Sylt
Tel.: 04651 5510, Fakso: 04651 21963

Hungario

*)

Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, HU-1201 Budapest
Tel.: 01 283 6566

KOTIZOJ DE KELI 2001

Individua membro (kun Dia Regno)	15,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	22,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	300,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	12,00 EUR
per libroservo	14,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni „Espero Katolika” pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni „Dia Regno” pere de C.O. de IKUE	7,50 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj la ricevon de DR; donacoj estas bonvenaj)	Donace

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam por KELI-konto **kelk-p** en Belgio: 000-1631831-97
Germanio, Köln: 3182 91-509, BLZ 370 100 50

- Japanio** 15 EUR
Peranto: Seiziro Kawamura, Rex Kiyomizo-gojo 702,
Shin miyagawa-cho dori gojo agaru 2 yamadacho 501
Higashijama-ku-Kyoto 605
- Kazaĥstano (vidu ĉe Rusio)** *)
- Korea Respubliko** 15 EUR
Peranto: D-ro Puramo Chong, Kwangmyong-Shi
Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-Do, Sud-Koreio 423-012
- Latvio** *)
Peranto: Valdis Gulbis, Lielá iela 1 dz. 2,
Valdemárpils Talsu raj, LV-3260
- Litovio** *)
Peranto: Erikas Laiconas, p/k 165, LT-3000 Kaunas, Tel.: 370 7 222131
- Nederlando** 43 NLG
familiaj membroj 5 NLG
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de KUNE,
Kasistino: Gerda Dercks, Ootmarsumsestr. 47, 7607 AX Almelo
Tel.: 0546 819 403, Fakso: 0546 819 403
- Pollando** 24 PLZ
Peranto: Kazimierz Leja, poŝtfako 59, 41-250 Czeladź
Tel.: 032 763 37 13; 0605 305950
- Rumanio** *)
Peranto: Maria László, C.P.202, 4800 Baia Mare
Tel.: 062 426182
- Rusio (inkl. Belarusio, Kazaĥstano kaj Ukrainio)** *)
Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25 A, RU 622013 N. Tagil,
Sverdlovskaja Obl. Rusio
- Slovaka Respubliko (vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko)** *)
- Svedio** 160 SEK
familiaj membroj 20 SEK
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0 nome de Kristliga Esperantoförbundet.
Kasisto: Arne Lundkvist, Kyrkogatan 28, 33131 Värnamo
Tel.: 0370-13908
- Svislando** 15 EUR
familiaj membroj 2 EUR
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu supre)
- Ukrainio (vidu ĉe Rusio)** *)
- Usono** 15 EUR
Peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Raylor, Milwaukee, WI 53207
- *) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto.

Vortserĉludo

O	T	N	A	K	I	D	E	R	P
B	U	R	M	E	N	F	A	K	S
E	C	Ŝ	A	C	O	J	I	G	A
H	I	D	L	U	M	J	H	O	L
J	O	S	A	E	O	E	G	Ĉ	M
A	Z	T	Ĥ	D	F	S	O	M	A
Ĉ	E	E	I	S	K	A	Z	O	R
U	N	V	R	E	P	J	R	D	O
R	E	L	I	R	O	A	T	Z	B
L	G	A	Ĝ	M	E	V	O	T	E

En tiu vortserĉludo estas kaŝitaj 10 libroj de la Malnova Testamento. La vortoj troviĝas horizontale, vertikale aŭ ankaŭ diagonale en la diagramo. Ili povas parte koincidi aŭ esti skribitaj returne.

Fritz LAUTENBACH

Solve de la krucvortenigo 824

Horizontale: 1. sakristi', 7. remi, 8. Kr, 10. vi, 11. et, 12. sanitaro, 15. ord', 16. par', 17. Fe, 18. op, 20. re, 21. aren', 23. Nazareto.

Vertikale: 1. saksofon', 2. Kr, 3. revu, 4. imit', 5. si, 6. interezo, 9. rare, 11. erar', 13. Nd, 14. Ap, 18. ora, 19. per, 21. az, 22. ne.

Kromsolvo: Pasiono

Nekrologo

En 1992, okaze de la 8-a Ekumena Kongreso en Velence, Hungario, multaj el niaj legantoj la unuan fojon vidis la preskaŭ legendan paron el Usono, pri kiu ili eble ne nur unufoje trovis notojn dise tra la Esperanto-gazetaro: Armin kaj Mary DONEIS el Pharr, Texas, urbeto tute proksima al la landlimo de Usono al Meksikio.

Nun venis la informo, ke Armin forpasis la 30-an de oktobro, 94-jara.

KELI kaj la usona Esperanto-movado perdis unu el la plej memorindaj figuroj. Mi havis la bonŝancon persone renkonti la paron jam pli frue, okaze de deĵoroj

en Usono.

Armin F. DONEIS naskiĝis la 10-an de aŭgusto 1906 en Milwaukee. Profesie li laboris kiel inĝeniero pri fridigo. Li aktivis en la metodista eklezio de Pharr kaj membris ankaŭ en la metodista eklezio de sia somera rifuĝejo en norda Wisconsin. Esperanto kaj ĉiuj klopodoj pri paco kaj socia justeco por li estis afero de la koro. En la 50-aj jaroj li prezidis la Esperanto-Ligon por Norda Ameriko, kaj en la 60-aj kaj 70-aj li estis ĉefdelegito de UEA por Usono.

Ne nur per vortoj kaj multaj leteroj li konigis siajn vidpunktojn kaj protestojn pri sociaj demandoj al lokaj, ŝtataj kaj federaciaj instancoj kaj gvidantoj. Regule li rifuzis pagi al la financa oficejo tiun parton de la impostoj uzatan por armado kaj militismaj celoj, ĝirante ĝin al speciala konto. Tio konfliktis kun la leĝo kaj ofte kostis al li ekstran pun-pagon, sed li neniam cedis.

Wilhelm STOLL, metodisto kaj KELI-aktivulo en Stuttgart en la tempo, kiam mi estis relative nova en la movado, ofte rakontis pri la impresoj, kiuj lasis la Esperantista familo Doneis, kiam ili, patro, patrino kaj tri gefiloj, en la 50-aj jaroj vagabondis plurajn monatojn tra Eŭropo, ĉiam uzante Esperanton. Armin verkis interesan raporton (en angla lingvo) pri tiuj fruaj spertoj. Okaze de gravaj dat-revenoj — 80-jariĝo, 90-jariĝo, la gazetaro en lia urbo aperigis ampleksajn artikolojn kun kolor-bildoj pri la nekutima familio, tute internaciema kaj tamen plene usona. Al Mary, kiu profesie instruis muzikon kaj ludis, eble eĉ nun plu ludas violonĉelon en la simfonia orkestro de Suda Teksaso, kaj al la gefiloj (kun dek unu nepoj kaj dek kvin pranepoj) iras la kondolenco de KELI, sed al nia ĉiela Patro la profunda danko, ke ni havis lin en niaj vicoj.

Adolf BURKHARDT

HUMANISTO KAREL ČAPEK

Karel ČAPEK apartenas al tiuj nemultaj ĉefaj aŭtoroj, kiuj jam dum sia fruktodona vivo famiĝis ne nur en sia patrolando, sed eniris ankaŭ sur mondan Parnason. Li estis ĝisfunda demokrato kaj por li la ununure akceptebla filozofio estis humanismo. Li intuicie sentis kontrastojn inter homa moraleco kaj rapida evoluo de scienco, kaj li antaŭvidis minacon, kiun misuzo de sciencaj rezultoj povas al la homaro alporti ĝis sojlo de ĝia neniigo.

Per siaj verkoj li metafore avertis kontraŭ la danĝero de naziismo, senkapa kaj perforta kolektivismo, kontraŭ konkeraj militoj kaj senbrida ekspluatado de tekniko. Multo el liaj profetaj vizioj plenumiĝis kaj la homaro pagis alte pro tio, ke la avertoj de la aŭtoro estis neglektitaj.

Karel ČAPEK devenas de klera kaj artisma familio. Lia frato Josefo estis ankaŭ verkisto kaj unuavica moderna ĉefa pentristo. Verkadis ankaŭ lia fratino Helena. Li naskiĝis en Orientbohema vilaĝeto Malé Svatonovice, kie lia patro deĵoris kiel doktoro. Juna Karel studis gimnazion kaj poste filozofion en Prago, kie li poste vivis kun sia frato. Studrestadojn li frekventis ankaŭ en Berlino kaj Pariza Sorbono.

Li fariĝis homo kun ekstrema sentemo kaj monda orientiĝo. Krom la patra li majstre regis kelkajn lingvojn. Tio ebligis al li vaste traduki en la ĉefan lingvon verkojn el la moderna franca poezio. Per tio li metis fundamenton al la moderna ĉeĥa tradukarto. En 1917 li fariĝis ĵurnalisto kaj kun tiu profesio estis ligita lia tuta vivo kaj ankaŭ la plej granda parto de lia verkaro. Li publikigis sennombrajn felietonojn, rakontojn, kontribuajetojn, noticojn

eĉ romanojn. Preskaŭ ĉiuj liaj verkoj libroforme aperintaj unue publikigiĝis en ĵurnalo escepte de dramoj. Tiuj ĉiam vekis grandan intereson kaj varman akcepton de la publiko pro liaj profundaj humanecaj ideoj. Kelkaj el ili estis rezulto de komuna kunlaboro de ambaŭ fratoj.

Vizioj de Karel ČAPEK plej emocie esprimiĝas en la dramoj „RUR” (en ĝi unuafoje estis uzita la vorto „roboto”, kiun elpensis lia frato Josefo), „La Blanka malsano” kaj „Patrino”. En ili estis profetaĵoj, kompreneble en arta hiperbolo, kiuj poste vere efektiviĝis. Kvankam ili ne estis al iuj rekte adresitaj, tamen ekzemple la premiero de „La Blanka Malsano” en 1937 vekis oficialajn protestojn de naziisma Germanio kaj kontraŭ la aŭtoro leviĝis granda ondo de kolero de faŝistoj, kiuj minacis al ČAPEK pri mortigo.

La aŭtoron certe renkontus kruela sorto de lia frato Josefo, kiu pereis fine de la dua mondmilito dum la tiel nomata „marŝo de morto” el nazia koncentrejo, se li mem ĝuste antaŭ la okupacio de Ĉeĥoslovakio ne mortus la 25-an de decembro 1938.

La pensoj de Karel ČAPEK, kiujn li metis en sian verkaron restas daŭre validaj kaj por la homaro avertigaj. Tion dokumentas ankaŭ novaj diverslingvaj tradukoj kaj eldonoj de liaj libroj. Inter tiuj ofte estis ankaŭ Esperanto, en kiu aperis jam sep titoloj de Karel ČAPEK kaj pluraj tradukoj en manuskriptoj atendas sian eldoniston.

Vlastimil KOČVARA

DIAN BENON EN LA NOVAJ: ĴARO,
ĴARCENTO KAJ ĴARMILO, DEZIRAS
AL ĈIUJ LEGANTOJ DE ĜIA REGNO

Eldonejo HEJME